

## Marita Kruijswijk: Frisa muziko en la nuna tempo

Post la dua mondmilito oni malmulte atentis tradician, propralandan muzikon; do tiel estis ankaŭ rilate al frisa muziko. Sed komence de la sepdekaj jaroj tuta Okcidenta Eŭropo spertis **folkloran reviviĝon**. En Nederlando tio manifestiĝis en kreskanta intereso pri la tradicia muziko el anglalingvaj landoj, kiel ekzemple Anglio, Skotlando kaj Irlando. Estis tamen ankaŭ muzikistoj, unue en Flandrio kaj iom poste same en Nederlando, kiuj esploris la heredaĵojn de la tradicia muziko el sia propra lando aŭ regiono.

En Frislando **Roel Slofstra** estis la unua kiu ekaktivis kiel frislingva trobadoro. Tiel li kreis la fundamenton sur kiu la frisa muzika kulturo refloriĝis. Li koncertis ne nur en Nederlando, sed ankaŭ en Germanio kaj Belgio, kunlaborante interalie kun la konata flandra grupo 't Klikske. Slofstra utiligis multajn tekstojn de poetoj kaj aŭtoroj el sia propra epoko (unu el la plej gravaj estis Sybe Krol), kiel ankaŭ popolkantojn. La muzikon kutime li verkis mem. En 1969 aperis lia unua gramofondisko, titolita **In Spyltuech bin ik** (“Muzikilo mi estas”), sur kiu li aŭdigas bibliajn poemojn de la poeto Fedde Schurer. Poste sekvis multaj pliaj gramofondiskoj kaj ekde 1995 ankaŭ kompaktdiskoj. Lia disko **'t Hert sil tille fan syn wille** (“La koro leviĝos pro ĝojo”) enhavas nur kantojn kun teksto kaj muziko ĉerpitaj el malnovaj fontoj, ĉefe de la 19-a jarcento. La kantadon de Roel akompanas en klasika stilo klavicenso, transversa fluto kaj violonĉelo. Ĉi tiu disko originas el 1973, kaj la enhavo reaperis en 1995 sur la kompaktdisko **Roel Slofstra: Liedjes uit Friesland** (“Kantoj el Frislando”).

Filmeto de Roel Slofstra, farita okaze de la apero de lia lasta kd **Wis en wrachtig** (“Tutcerte”) en 2008, troviĝas ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=trd0NFBGFVc>



Plia muzikisto, la kantisto/gitaristo **Nanne Kalma**, ekserĉis tradiciajn frisajn kantojn, kun la celo prilabori ilin en la stilo de konataj anglaj folkloraj grupoj de tiu tempo. Konstatinte ke tia materialo ne konserviĝis, li decidis mem fari kantojn en folkloro stilo. Plurajn konatajn frisajn poetojn, kiel ekzemple Sybe Krol, Jan Tulp kaj Herke Wijnalda, li petis ke ili verku por li tekstojn, kaj kunlabore kun la kantistino Inez Timmer, li ellaboris planon por studia projekto. Rezultis gramofondisko kun frislingva folkloreca rokmuziko, aperinta en 1975. Ili nomis la studian

grupon **Irolt** kaj la disko titoliĝas **De Gûdrûn Sêge** (“La Gudrun-sagao”), laŭ epopeo notita skribe en la 13-a jarcento. Registraĵo de konata kanto el ĉi tiu disko, nome **It wite wiif** (“La blanka virino”), aŭskulteblas ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=vTsqrcll0oQ>

De Gûdrûn Sêge estis la unua frislingva disko en tiu stilo, kaj ĝi fortege impresis la publikon. En tuta Nederlando vendiĝis miloj da ekzempleroj, kaj ĝi instigis multajn al kantado en la frisa lingvo (ekzemple la kantiston Doede Veeman kaj la grupon Jarje). Irolt abunde ricevadis invitojn koncerti, ne nur en tuta Nederlando, sed ankaŭ en Belgio, Germanio kaj Anglio. Dum la jaroj la konsisto de la grupo plurfoje ŝanĝiĝis, kun Nanne Kalma kiel la konstanta faktoro. Irolt produktis entute 7 gramofondiskojn, unue en folklorarokmuzika stilo, sed ekde 1979 nur akustike. Ĝia agado grave kontribuis al plivastigo de la frisa lingvo en la muzika kulturo. La grupo finfine ĉesis en 1987.

Nanne Kalma plu aktivis kun la kantistino Ankie van der Meer, duope kaj en la grupo **Kat yn 't Seil** (“Kato en la velo”), kies repertuaro estis parte frislingva kaj parte nederlandlingva.

*En 1994 la enhavo de ĉiuj Irolt-diskoj, kompletigita per pluraj nepublikigitaj kaj kelkaj novaj kantoj, (entute 105 eroj) aperis kiel kolekto de 4 kompaktdiskoj, titolita **Ier of Iet** (“Frue aŭ malfrue”). La kolekton akompanis libro kiu enhavis priskribon de la historio de la grupo kaj ankaŭ ĉiujn kantotekstojn kaj muzikaranĝojn.*



En 1978 Nanne Kalma kaj Roel Slofstra kun-iniciatis la unuan frisan folkloran muzikfestivalon. La festivalo nomiĝis **Tsjoch** kaj okazis en la muzikteatro 't Bolwerk en la urbo Sneek. Oni priskribis ĝin “mirinda evento plena de frisa folkloro muziko kaj dancado”. Unu jaron poste, do en 1979, fondiĝis la Asocio de Frisaj Popolmuzikistoj, ankaŭ sub la nomo **Tsjoch**. Ekde tiam la asocio okazigis ĉiujare (ĝis 2014) muzikfestivalon, plejofte en teatro De Lawei en la vilaĝo Drachten. Krome Tsjoch organizas ĝis nun ĉiusezone plurajn Tsjoch-koncertojn same kiel Tsjong-vesperojn – temas pri vesperaj eventoj kun malferma podio por konataj kaj nekonataj artistoj.

*Jenaj muzikiloj estas speciale popularaj en la folkloro muziko kaj do ankaŭ la frisa folkloro muziko: gitaro, violono, akordiono, tirsako, koncertino, kontrabaso, mandolino, banĝo, harpo, vjelo, sakŝalmo, fluto, trombono kaj klarneto. Speciale en Frislando oni ludas ankaŭ la nordan trabon, precipe de kiam la muzikil-faristo Evert Kluter revivigis ĉi tiun antikvan instrumenton.*



Post la furoro de la novefarita frislingva folkloro muziko, estiĝis ankaŭ multe da frisa muziko en aliaj stiloj.

Ekde 1987 okazas ĉiujare unutaga popfestivalo en la vilaĝo Nijland, nomata **Aaipop**, ekskluzive kun frislingve kantantaj bandoj. Konataj frisaj artistoj kiuj jam koncertis tie estas ekzemple Piter Wilkens, Doede Veeman, Reboelje, Gurbe Douwstra, De Kast kaj Jaap Louwes. Video de Doede Veeman kun la kanto **Wat moat der better** (“Kio devas pliboniĝi”) videblas ĉe:

<https://www.youtube.com/watch?v=F40EqNlyotY>

En 1997 la grupo **De Kast**, kiu devenas el la frisa vilaĝo Zwaagwesteinde, gajnis rimarkindan sukceson eĉ ekster Frislando per sia kanto **In nije dei** (“Nova tago”). Registraĵo de ĉi tiu kanto videblas ĉe: [https://www.youtube.com/watch?v=Xv695Jn1\\_JY](https://www.youtube.com/watch?v=Xv695Jn1_JY) Krome ekzistas ekde 1991 ĉiujara muzikokonkurso en la frisa ĉefurbo Leeuwarden, speciale por kantistoj kiuj volas prezenti belajn tekstojn en la frisa lingvo. Ĝi estas la frisa kantofestivalo **Liet** (“Kanto”). Inter la iamaj gajnintoj estas Nynke Laverman, Sebear kaj Adri de Boer. La duopo **Twarres**, el la vilaĝo Warga, kiu konsistis el Mirjam Timmer kaj Johan van der Veen, plej multe famiĝis ankaŭ ekster Frislando. En 1999 la publiko de Liet aljuĝis al Twarres premion pro ĝia kanto **Wêr Bisto** (“Kie vi estas”), kiu aperis sur disko en 2000.



Registraĵo de ĉi tiu kanto videblas ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=366zTb-2VbI>  
Ekde 2001 Twarres kantis nur anglalingve, kaj en 2004 Mirjam kaj Johan ĉesis kiel duopo.

Mirige estas ke de post 1950 apenaŭ ekzistis intereso revivigi frisan muzikon el antaŭaj jarcentoj. Sed espereble tiun intereson sukcesos vekti nova kompaktdisko kun modernaj, folklorecaj prilaboraĵoj de antikva frisa muziko. Ĉi tiu kd aperos en la printempo de 2015, kaj produktas ĝin la frisa folkloro grupo **Kapriol'**; du el ĝiaj anoj (Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse) iam formis la grupon Kat yn 't Seil kune kun Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer.



La tekston tradukis el la nederlanda al Esperanto: Arjen-Sjoerd de Vries